Heinrich Heine,

# Belsazar

Die Mitternacht zog näher schon;
In stummer Ruh lag Babylon.

Nur oben in des Königs Schloß
Da flackerts, da lärmt des Königs Troß.

Dort oben in dem Königssaal
Belsazar hielt sein Königsmahl.

Die Knechte saßen in schimmernden Reihn,
Und leerten die Becher mit funkelndem Wein.

Es klirrten die Becher, es jauchzten die Knecht';
So war es dem störrigen Könige recht.

Des Königs Wangen leuchten Glut;
Im Wein erwuchs ihm kecker Mut.

Und blindlings reißt der Mut ihn fort;
Und er lästert die Gottheit mit sündigem Wort.

Und er brüstet sich frech und lästert wild;
Der Knechte Schar ihm Beifall brüllt.

Der König rief mit stolzem Blick;
Der Diener eilt und kehrt zurück.

...

Heinrich Heine,

# Belŝacaro

*tradukita de Richard Schulz*

Jam pasis de la nokt' duon'.
Trankvile kuŝis Babilon'.

Nur supre en la reĝkastel'
Fenestrojn traflagras torĉa hel'.

Reĝ' Belŝacar' de Babilon'
Festenis en la festsalon'.

Tumultis laŭte de l' reg' sekvantar'.
Tintigis pokalojn barbar' kun barbar'.

La reĝo aŭskultis obstine kun ĝu'
La virojn jubili, pliiĝon de l' bru'.

Ekardas tre la reĝa vang'.
Riskemas tre la reĝa lang'.

Kaj senpripense pekas li
Kaj blasfemas terure, spitante al Di'.

Kaj paradas sen hont' kaj kun defi'.
Aplaŭdas tre la koteri'.

Orgojle sonas de l' reĝ' ordon'.
Jam hastas kaj revenas peon'.

...

Er trug viel gülden Gerät auf dem Haupt;
Das war aus dem Tempel Jehovas geraubt.

Und der König ergriff mit frevler Hand
Einen heiligen Becher, gefüllt bis am Rand.

Und er leert ihn hastig bis auf den Grund,
Und er rufet laut mit schäumendem Mund:

“Jehova! dir künd’ ich auf ewig Hohn –
Ich bin der König von Babylon!“

Doch kaum das grause Wort erklang,
Dem König wards heimlich im Busen bang.

Das gellende Lachen verstummte zumal;
Es wurde leichenstill im Saal.

Und sieh! Und sieh! An weißer Wand,
Da kam’s hervor wie Menschenhand;

Und schrieb, und schrieb an weißer Wand
Buchstaben von Feuer, und schrieb und verschwand.

Der König stieren Blicks da saß,
Mit schlotternden Knien und totenblaß.

Die Knechtenschar saß kalt durchgraut,
Und saß gar still, gab keinen Laut.

. . .

Surkape pezas la ora vazar’,
El templo Javea la rab-akapar’.

Kaj ekprenis la reĝ’ per krima man’
La plej sanktan pokalon kun fia rikan’.

Kaj li malplenigas ĝin ĝis la fund’,
Kriaĉas el malvirta abund’:

“Javeo, mi mokas pri via kron’ -
Mi estas reĝo de Babilon’!”

Apenaŭ sonis for la vort’,
La reĝon ekkaptis la tim’ de l’ mort’.

La akra ridado formortis je l’ hor’.
Silentis tuj la vira ĥor’.

Jen vidu! el la blanka mur’
Aperis homa mankontur’.

Kaj skribis, skribis sur la mur’
Kaj ree foriĝis post flamgravur’.

Jen ankaŭ for regal-plezur’.
Rigide rigardis la reĝ’ pro terur’.

La viroj sidis mutaj pro tim’.
Horor’ sentiĝis en ĉies anim’.

. . .

Die Magier kamen, doch keiner verstand
Zu deuten die Flammenschrift an der Wand.

Belsazar ward aber in der selbigen Nacht
Von seinen Knechten umgebracht.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* HEINRICH HEINE *(∗1797-12-13 – †1856-02-17).*

*Arg-205-407 (2004-03-06 17:43:12)*

Eĉ magoj ne sciis laŭ rita mezur'
Klarigi la flamskribaĵon de l' mur'.

En tiu ĉi nokt', de la servistaĉar'
Murdata estis Belŝacar'.

*Traduko de la Germana poemo "Belsazar" de* HEINRICH HEINE *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* RICHARD SCHULZ *(Rikardo Ŝulco, ∗1906-07-12 – †1997-09-26).*

*Arg-205-409 (2013-02-26 15:10:47)*

*Tiu traduko aperis en 1984 en la n-ro 61, 1984/7 de la "Vestfaliaj Flugfolioj", kiun Richard Schulz, kiu nomis sin Rikardo Ŝulco, eldonis mem. Li indikis kiel aŭtoron de la germana-lingva originalo: Henriko Hajno. Tiu estas la germana poeto Heinrich Heine. Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon* `http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz`.